

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

30-a Jarkolekto * Junio 2016 * N-ro 101

ISSN 1576-0618



**Roquetas de Mar: blua maro, pura ĉielo
kaj la plej riĉa el la teroj.**

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
Vivo de la Asocio	4
20-a Andaluzia Kongreso de Esperanto	6
La onubano kiu donis sian nomon al fora tero	15
Lingva Angulo	18
Turismi en Roquetas de Mar.....	20
Paĝoj pri nia Historio	24
Flamenko	27
Andaluzia Kuirarto	29
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio.....	31
Krucvortenigmo	33
Humuro	34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



PUENTE GENIL (Kordovo)

Nia samideano Fernando ESTEPA organizis en la kordova vilaĝo Puente Genil bazan kurson de la internacia lingvo, ĉeestis kaj finis la kurson kvar homoj, kelkaj el ili poste ĉeestis la andaluzian kongreson en Antekero. Espereble oni organizos baldaŭ novajn kursojn kaj agadojn en ĉi tiu kordova vilaĝo.

KADIZO

La kultura anarkisma Ateneo “Fermín Salvoechea” de Kadizo interesiĝas pri Esperanto. Do, respondeculo de tiu kultura centro ĵus kontaktis kun nia asocio cele la organizadon de prelego pri Esperanto kaj la rilatoj de la internacilingva movado kun anarĥismo kaj se eble, okazigi postan kurson de esperanto en la urbo Kadizo. Nia asocio jam sciigis al ili favoran reason. Ni pluinformos pli detale kiam oni decidos la daton kaj lokon de la prelego.

ALMERIO

De la 14-a ĝis la 22-a de oktobro okazis en la andaluzia urbo Almerio la Seniora Festivalo, renkontiĝo speciale dediĉita al +50-jaraĝuloj kun la celo praktiki sportojn, komune ekskursi, ĝui hobiajn, ktp. La organizantoj pripensis ankaŭ organizi kulturajn agadojn kaj inter ili oni

planis ekigi kurson de la internacia lingvo, kunlabore kun la Universitato de Almerio. La respondeculo de la instruado estus S-ro Dennis Keefe, usona esperantisto kiu nuntempe respondecigas pri Universitato de Esperanto en la ĉina insulo Hajnano. Bedaŭrinde la kurso finfine ne povis okazi, ĉefe ne multaj gepartoprenantoj interesiĝis pri kulturaj agadoj dum la festivalo kaj pro tio preskaŭ ĉiuj kulturaj agadoj nuliĝis, do okazis nur sportaj konkursoj kaj ekskursoj.

VIVO DE LA ASOCIO



★ Antaŭtempe Andaluzia Esperanto-Unuiĝo aprobis la starigon de la stipendio “Felipe González del Pino”, kies celo estas ebligi al andaluzo sekvi universitatajn studojn pri Esperanto kaj/aŭ Interlingvistiko en eksterlandaj universitatoj. La unua homo kiu ricevis ĉi tiun stipendion estis nia arunda samideanino Fátima Jiménez García, kiu ekde antaŭ du jaroj sekvas studojn en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan (Pollando). Espereble post Fátima venos novaj lernantoj pretaj perfektigi sian studojn pri Esperanto.

★ Dum la monato januaro okazos la Eksterordinara Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ni pluinformos pri la ekzakta dato kaj loko de la renkontiĝo. La ĉefa traktenda punkto de la asembleo estos la nomumo de nova estraro. Do, se Vi deziras labori por nia asocio ne hezitu proponi Vin mem por unu el la jenaj postenoj: prezidanto, vicprezidanto, sekretario, kasisto aŭ voĉdonanto.

★ Kvankam la laboro ankoraŭ ne finiĝis, nia asocio revivigis sian TTT-paĝon www.esperanto.ac La laboro ne finiĝis, ĉar oni devos sciigi pri multaj pliaj detaloj pri la andaluzia kulturo kaj ankaŭ pri la internacia lingvo, do, se Vi fakas pri informadiko kaj ĉefe pri produktado de TTT-paĝoj sciigu tion al nia asocio.

★ Bedaŭrinde dum la jaro 2016 aperis neniŭ verko pri aŭ en esperanto en Andaluzio. Tamen la skipo kiu preparas libron pri la historio de Esperanto en la urbo Sevilo daŭre laboras kaj espereble la verkaĵo aperos dum la jaro 2017. Dum la venonta jaro ankaŭ aperos libro enhavanta unu el la legendoj de Gustavo Adolfo Bécquer, “*Majstro Pérez, l’orgenisto*”.

★ Ni jam informis pasint-numere, ke novaj delegitoj de Universala Esperanto-Asocio jam aperas sur la lasta *Jarlibro* de la internacia asocio de la Esperanto-movado. Do, la urboj *Córdoba*, *Málaga* kaj *Ronda* jam aperas sur tiu libro kaj estas eble kontakti kun la tiea esperantistoj. Tamen, la celo de nia asocio estas kalkuli kun UEA-delegitoj en ĉiuj andaluziaj provincoj, do, se Vi apartenas al Universala Esperanto-Asocio kaj deziras fariĝi delegito en Via urbo kontaktu kun la ĉefdelegito en Hispanio de tiu asocio pere de la adreso:
esperanto14@ono.com



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la reto:

TTT-paĝo: www.esperanto.ac (ankoraŭ ne definitive konstruita).

Blogo: <http://andaluciaesperanto.blogspot.com.es/>

Ret-adreso: esperanto14@ono.com

20-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

Antekero (Malago) de la 29-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2016.

Meze de Andaluzio troviĝas urbo kies arkeologiaj restaĵoj pravas, ke homoj loĝas tie de antaŭ 6.000 jaroj. Ankaŭ viziteblas tie mirinda natura parko, tra kie eblas promenado kaj pinte de tiu parko stariĝas astronomia observejo, kies potenca teleskopo ebligas vidi la plej forajn stelojn kaj universojn kaj ĉi ĉio ĉirkaŭigita da oliv-arba oceano. Tiu loko nomiĝas Antequera (Antekero en la internacia lingvo) kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo decidis organizi tie la 20-an Andaluzian Kongreson de Esperanto fine de la pasinta monato oktobro.

Krome, UNESKO antaŭ kelkaj monatoj deklaris la neolitikajn dolmenojn de Antekero kiel Mondan Heredaĵon, tio certe estis plia allogaĵo por viziti kaj ĝui ĉi tiun belegan urbon. La esperantistaro faris tion.

La ĉeftemo de la Kongreso estis “Esperanto kaj Naturo: ĉielo kaj tero”. Pere de ĉi tiu frazo ni deziris montri al la gepartoprenantoj, ke estas eble rigardi la mirindaĵojn havigitajn de la Naturo ankaŭ pere de la internacia lingvo, do, kvankam ne ĉiuj, la prelegoj kaj programeroj de la kongreso disvolviĝis ĉirkaŭ tiu ĉefa temo.

La kongreso komenciĝis la sabaton 29-an de oktobro per oficiala malfermo ĉe la kunveno de la Muzeo de Antekero. La inaŭguron ĉeestis Skabenino pri Kulturo de la Urbodomo kaj post ŝiaj vortoj la Prezidanto de nia Asocio, Ángel Arquillos, bonvenigis la ĉeestantoj kaj oni prezentis ĉiujn programerojn plenumotajn dum la Kongreso.



20a Andaluzia Kongreso de
ESPERANTO

Antekero, 29a oktobro / 1a novembro 2016




Inaŭguro de la Kongreso ĉe la Muzeo de Antekero

La unuan prelegon prononcis D-ro Rikardo Felipe ALBERT REYNA, sur la supra fotografiaĵo la unua maldekstren, docento en la Aŭtonoma Universitato de Madrido, pri la temo “Lingva situacio en la Eŭropa Unio post la *briteliro*”. D-ro ALBERT sciigis al ni pri la diversaj scenejoj kiuj oni povos travivi en la Eŭropa Unio, el la lingva vidpunkto, se finfine Britio forlasas la eŭrop-uniajn instancojn. Poste, ĉiuj ĉeesantoj iris en la Publikan Bibliotekon, tie oni malkovris afiŝon omaĝe al fama esperanto-verkisto kiu naskiĝis en Antekero, S-ro Higinio GARCÍA GÓMEZ-QUINTERO, sed, kiu li estis?

Higinio GARCÍA naskiĝis en Antekero en la jaro 1939. Li jam infan-aĝe estis avida leganto kiu deksejara legis libron kie oni menciis ion pri lingvo nomita Esperanto. Li tuj lernis la internacian lingvon ĵus malkovrita de li. Jun-aĝe li studis en la Universitato de Madrido Filozofion kaj Klasikajn Lingvojn kaj post la fino de siaj studoj li decidis fariĝi instruisto. Tamen, la tiutempa situacio en Hispanio tute ne plaĉis al li, do, komence de la 60-a jardeko li iris en Kanadon, tie li estus, unuamomente, profesoro pri la hispana lingvo kaj poste docento pri Filozofio en kebekia universitato. Samtempe li kunlaboris kun la

tiea esperanto-asocio kaj eĉ redaktis la franclingvan bultenon de la esperantista asocio de Kebekio. Li ankaŭ verkis novelojn, tiuj plej fama estas *Kapturnoj* (1999). Higinio edziĝis en Kanado kaj de tempo al tempo revenis en Hispanion por turismi, okaze de ĉiuj vizitoj li ĉiam venis en Antekeron. Li forpasis en la jaro 2010.



La Skabenino pri Kulturo kaj la Prezidanto de AEU malkovras afiŝon omaĝe al esperantisto Higinio García Gómez-Quintero

Kiel dirite, dum la Kongreso oni decidis iamaniere omaĝi ĉi tiun elstaran antekeran esperantiston, tiel la municipaj aŭtoritatuloj akceptis malkovri afiŝon ĉe kultura centro de la urbo, pere de ĝi oni sciigas, hispanlingve kaj en esperanto, ke li estis elstara verkisto en la internacia lingvo. Okaze de la omaĝo S-ino Marie France FILLION, vivdino de S-ro Higinio García, sendis mesaĝon el Kanado.

Dumvespere, oni organizis promenadon tra la Natura Parko *El Torcal*. Temas pri belega natura spaco, tute malsimila al ĉio ĉirkaŭanta. Tie, la mara erozio, ĉar la zono antaŭ milionoj da jaroj troviĝis submare, formis spektaklajn figurojn el ŝtono. La partoprenantoj promenadis dum kelkaj kilometroj, ne tro multaj kompreneble, kaj la vojo finiĝis ĉe la astronomia observejo lokigita pinte de la Natura Parko. Tie, D-ro David GALADÍ ENRÍQUEZ,

astronomo ĉe la Astronomia Observejo *Calar Alto* kaj prestiĝa astronomia aŭtoro, prelegis pri ĉiutaga astronomio kaj kiamaniere ni povas vidi la firmamenton nudokule. Poste, oni organizis komunan nokto-maĝon en la Parko mem kaj tiu unua tago finiĝis per astronomia observado gvidita de D-ro David GALADÍ kaj de la Direktoro de la Observejo kiu tre afable kunlaboris en la sukceso de la programero.



Ekskurso en la
Natura Parko *El
Torcal*.

Samideaninoj,
kvazaŭ ŝnur-
dancistinoj, ĉe la
Natura Parko *El
Torcal*.





D-ro David GALADÍ, kun-aŭtoro de la prestiĝa libro *Kosmo kaj Ni*, parolas pri astronomio dum la Kongreso

Dimanĉe matene, Fátima JIMÉNEZ GARCÍA parolis pri dolmenoj, tiuj prahistoriaj konstruaĵoj uzitaj kun ceremoniaj kaj funebraj celoj, kiuj en Antekero estas eble trovi kaj ili jam estas Havaĵo de la Homaro, laŭ ĵusa deklaro farita de UNESKO. Post la prelego la ĉeestantoj promenadis por viziti la mondfamajn dolmenojn kiuj troviĝas apud la urbo.



Fátima Jiménez parolas pri dolmenoj... antaŭ viziti ilin.



Vizitantoj ĉe la pordo de unu el la dolmenoj.

Ni jam diris, ke la ĉeftemo de la Kongreso pritraktis naturajn temojn. Tiel, Heidi GOES, flandrino kaj konata esperantistino ĉe ekologiaj kaj vegetaranaj etosoj, parolis al ni pri arbara ĝardenado. Li vojaĝis tra Afriko kaj Indonezio kaj eĉ helpis la disvastigon de la internacia lingvo en ĉi tiu lasta lando. Post ĉi tiu prelego finiĝis la programeroj en la kongresejo dum tiu tago, tiam la gepartoprenantoj havis la ŝancon viziti la Muzeon de la urbo kaj promenadi tra la stratoj de Antekero. Tie, ili vizitis malnovajn stratojn kie eblis vidi faŝadojn de palacoj kaj nobelaj domoj, preĝejojn kaj la kastelon.

Lunde matene, la gepartoprenantoj iris per aŭtobuso viziti specialan muzeon. Temas pri muzeo kiu reale estas, aŭ estis, oliv-olea muelejo. La mondkonata kooperativa entrepreno DCoop havas en Antekero gravan produkt-centron pri oliv-oleo kaj pro tio ili starigis tie muzeon por montri la plej antikvan ilaron por elpreni tiun “verdanan oron” el la oliv-arboj. Ĉe la muzeo, kiu troviĝas je kelkaj kilometroj el la urbo kaj konstruita sur antikva muelejo, gvidistino montris al ni hispanlingve, kaj Rikardo F. Albert tradukis en esperanton, kiamaniere oni eltiris el la olivoj la oleon jam ekde la romia epoko. Vespere estis ŝanco denove por nia gastino Heidi GOES, kiu tiam montris al ni fotografajojn, kompreneble de ŝi mem komentitaj, pri siaj vojaĝoj en Angolon kaj Orientan Timoron.



En la oliv-olea muzeo, kie, post koni terkulturajn ilarojn, la ĉeestantoj havis la ŝancon gustumi panon kun oliv-oleo.

Poste, Fátima Jiménez disvolvigis la unuan sesion pri mikronoveloj. Ĉi tiu programero jam okazis pasintjare en Jerezo kaj ĝi estis tiel sukcesa, ke la organizantoj de la andaluzia kongreso en Antekero denove petis al Fátima organizi similan sesion. Ŝi parolis al la ĉeestantoj pri mikronoveloj: karakterizaĵoj, strukturo, ekzemploj... kaj ŝi eĉ invitis al ĉiuj verki mikronovelon. La lundaj programeroj finiĝis per hispanlingva prelego pri romano verkota de malaga aŭtoro, Leonardo Cervera, kiu planas verki libron pri la civila milito kie la ĉefrolulo estas esperantisto.

La kongreso finiĝis la lundon 1-an de novembro. Matene Fátima Jiménez daŭrigis la seminarion pri mikroliteraturo, ĉi-foje li parolis pri hajkoj kaj poste kelkaj partoprenantoj legis laŭte la mallongajn novelojn de ili redaktitaj laŭ la propono de Fátima dum la unua sesio. Fine, Rikardo F. Albert solvis la lingvajn dubojn kiuj tra la tuta renkontiĝo estis proponitaj de la ĉeestantoj, tiel li havis la eblecon konsili kiamaniere oni povus plibonigi la sciadon de la internacia lingvo.



Dumnokta promenado en Antekero

La fina punkto de la renkontiĝo estis speciala. La organizantoj de la Kongreso gratulis al tiuj kiuj realigis unu el la plej laŭdindaj esperanto-agadoj en Andaluzio dum la jaro 2016, tio estas, la produktado de videoj en Jutubo speciale dediĉitaj al infanoj. Temas pri projekto realigita de du sevilaj samideanoj, Pablo Bustos kaj Fran Lobato, kiuj de tempo al tempo ellaboras altkvalitajn videojn por instrui simplajn, sed efikajn, konojn al infanoj pri la internacia lingvo. Kvankam kun sonaj limigoj, ĉiuj ĉeesantoj povis vidi, kaj iomete aŭdi, la videon *Dek Bovinoj*.

Nu, kion oni povus diri kiel finan resumon? Verŝajne, la kongreso estis sukcesa. Ĉeestis sufiĉe granda nombro da gesamideanoj, la programeroj disvolviĝis akurate kaj en la internacia lingvo, krome la kvalito de la prelegantoj estis altega. Neforgesebla estos la promenado tra la Natura Parko, nia vizito al la Astronomia Observejo kaj la ekskurso al la dolmenoj. La etoso estis agrabla kaj la kunlaboro de la municipaj aŭtoritatuloj tiel esperplena, ke ni proponis al la Skabenino pri Kulturo de la Urbodomo organizi denove en Antekero ne nur

andaluzian kongreson sed ja hispanan, la respondeculino pri Kulturo tute akceptis.

Do, ni jam laboras en la ideo reveni en Antekeron post kelkaj jaroj kaj tiel organizi novan esperantistan kongreson meze de Andaluzio.



La onubano kiu donis sian nomon al fora tero

La insulo Diego García estas atolo en la insularo Ĉagoso, la sola insulo kun enloĝantoj en tiu insularo. Politike, ĝi apartenas al la Brita Teritorio de la Hinda Oceano kaj ĝi estas konata pro la fakto, ke sur ĝi troviĝas grava milita usona bazo. La insulo situas je 2.000 kilometroj el la sudo de Bharato (Hindio). La sendependa insularo Maldivoj estas la plej proksima ŝtato, nur je 750 kilometroj.



La nomo de la insulo, Diego García, reale estis la nomo de andaluzia maristo kiu naskiĝis en Moguer (Onubo). Sed, kiu li estis? Kiel dirite, li estis maristo kaj esploristo, kiu laboris kaj por la hispana kaj por la portugala reĝoj. Li partoprenis en la unua vojaĝo ĉirkaŭ la tero de la maristoj Fernão de Magalhães kaj Juan Sebastián de Elcano, inter la jaroj 1519 kaj 1522. Alia konata esploro de ĉi tiu maristo estis la eltrovo de Plata-rivero en Argentino, laŭ historiistoj, Diego García estis la maristo kiu plej bone konis la vojon en tiun riveron kaj kvankam, unuamamente, tiu rivero ricevis la nomon Rivero Solís, omaĝe al João Pedro Dias de Solis, verdire tiu kiu plej aktive partoprenis en la eltrovo de la tuta regiono estis Diego García, al tiu aventuro li dediĉis multajn jarojn kaj sian tutan monon.

Li ankaŭ realigis multajn aliajn vojaĝojn tra la Kabo-verda insularo, Brazilo kaj Urugvajo kaj laŭdire, li ankaŭ eltrovis insulon ĉe la Hinda Oceano, kiu poste ricevis lian nomon: *Diego García*. Tio

okazis en la jaro 1544, kvankam alia konata versio asertas, ke la insulon reale vizitis unuafoje en la jaro 1512 la portugala maristo Pedro de Mascarenhas, tamen post tiu ebla unua vizito la insulo restis tute forgesita kaj neniu kolonianto sidejis tie.



Elaera foto de la atolo

Kaj kio okazis ĉe la insulo? Nu, pro la fakto, ke la insulon eltrovis maristo je la servo de la portugala Reĝo, ĝi apartenis al Portugalio, almenaŭ el la politika vidpunkto, ĉar neniu enloĝanto troviĝis tie. En la jaro 1700 Portugalio cedis la insulon al Francio, kiu ĉiam depostulis tiun teritorion pro la fakto, ke ĝi estis tre proksima al la franca kolonio nomita *Insulo de Francio*,

nuntempe nomita *Maŭricio*. Sed malgraŭ ĉi tiu nova politika aparteno, la insulo daŭre restis ne-koloniigita, ĝis la fino de la 18-a jarcento, kiam Francio alvenigis en la insulon afrikajn sklavojn por terkulturi kokospalmojn.

Post la napoleonaj militoj, Diego García eniris en la Britan Imperion dank'al la subskribo de la Traktato de Parizo en la jaro 1814. Meze de la 19-a jarcento, tuj post la malpermeso de la sklaveco, ĉe Diego García loĝis 350 homoj kaj fine de la 19-a jarcento oni starigis tie la unuan preĝejon, do, oni povas paroli jam pri stabila enloĝantaro, kvankam ne tro nombra. La ĉefa produktado de tiu insulo estis la kokos-oleo kaj ankaŭ la provizado de ŝipoj navigantaj inter Azio, Oceanio kaj Eŭropo, post la malfermo de la Sueza kanalo en la jaro 1869.

En la jaro 1965 Britio disigis la koloniojn de Maŭricio kaj Diego García, cele konservi la regadon de Diego García post la sendependiĝo de Maŭricio. Tiel naskiĝis la politika internacia estaĵo nomita Brita Teritorio de la Hinda Oceano, al kiu apartenas la atolo Diego García kaj aliaj sen-homaj insuloj, eĉ kun propra interes-domajno .io . Ekde tiam, 1968, la nova ŝtato Maŭricio ade depostulas la teritorion de la atolo Diego García.

En la jaro 1966 la insulon luigis Britio favore al Usono, la traktato daŭriĝas ĝis 2016, cele la starigon tie de milita bazo. Unu el la kondiĉoj de tiu akordo estis, ke la insulo devis resti sen-homa kaj senbesta, ĉar Usono alvenigus novajn militistajn enloĝantojn. Tiel, Britio devige forpelis la tiutempajn 1.800 enloĝantojn al la apudaj insuloj Maŭricio kaj Sejŝeloj. La Supera Brita Tribunalo juĝis, ke tiu forpelo estis kontraŭ-leĝa, do la enloĝantoj rajtus reveni en siajn hejmojn, tamen ĝis nun Britio malebligis la efikon de tiu juĝo.



Milit-flughaveno sur la atolo
Diego García

Nuntempe, ĉe la insulo troviĝas 2.000 usonaj militistoj kaj tie troviĝas grava ŝip-bazo kaj flughaveno, kie kapablas surteriĝi la kosmo-navedoj se tio urĝas kaj ankaŭ oni starigis tie stacion por ricevi informojn de spionaj sputnikoj.

Nu, Diego García estis andaluzia maristo kiu ne nur vivis aventurojn en Afriko kaj en Ameriko, sed li ankaŭ nomigis belegan paradizon, bedaŭrinde nun milit-bazo.

Do, se vi iufoje vidas land-karton, sciui, ke eĉ en la fora Hinda Oceano troviĝas malgranda peco de andaluzia tero.

Lingva Angulo

La Prepozicio PRI

PRI estas prepozicio kiu montras temon, tion, kion ago traktas aŭ koncernas. En la hispana lingvo ni povas traduki PRI kiel “*acerca de...*” “*sobre...*”. Sed atentu, ne konfuzu tiu “*sobre*” kun la signifo de la prepozicioj “*sur*” aŭ “*super*”.

Jen kelkaj ekzemploj:

La libro temas pri matematiko → *El libro trata de matemáticas.*

Li parolis al siaj gepatroj pri sia fianĉino → *El habló a sus padres acerca de su novia.*

La kuracisto konsilis al mi pri la plej taŭgaj nutraĵoj → *El médico me aconsejó acerca de los alimentos más adecuados.*

Pri kio vi pensas? → *¿Acerca de qué piensas?*

Mi pensas pri mia amata amiko → *Pienso en (acerca de) mi querido amigo.*

Ĝenerale, li neniam parolas pri tiuj aferoj al mi, ĉar li opinias, ke mi scias nenion pri tio. → *Generalmente, él nunca me habla de esas cuestiones, porque opina que yo no sé nada acerca de eso.*

La akuzito kulpas pri murdo. → *El acusado es culpable de asesinato.*

Kvankam ne temas pri ofta uzo de PRI, ĝi ankaŭ povas esti uzata kiel prefikso en vortoj kun a-finaĵo. Tiel:

La libro temas pri amo / *priama libro.*

La prelego temas pri lingvoj / *prilingva prelego.*

Tio povas esti utila por unuigi du frazojn, ekzemple:

Mi havas libron kiu temas pri esperanto = Mi havas priesperantan libron.

Ĝis nun ni vidis, ke la prepozicio PRI, kiel ĉiuj aliaj prepozicioj, situas sole post la verbo:

En sia prelego li traktis pri hispana literaturo → *En su conferencia el trató acerca de la literatura española.*

Tamen, PRI ankaŭ povas esti uzata kvazaŭ prefikso, se oni antaŭmetas ĝin en la verbon, tiumaniere PRI kreas objektan verbon, eĉ se la verbo estas senobjekta:

En sia prelego li pritraktis hispanan literaturon → *En su conferencia el trató acerca de la literatura española.*

Do: Verbo+PRI+komplemento = PRI-verbo+rektan objekton.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- Li silentis pri la afero = Li prisilentis la aferon.
(*Él guardó silencio sobre la cuestión*)
- Li pensis pri sia nova amiko = Li pripensis sian novan amikon.
(*Él pensó en su nuevo amigo*)
- Mi parolis pri historio = Mi priparolis historion.
(*Yo hablé de historia*)

Kvankam verdire tiu uzo estas iomete literatura.

Do, memoru, ke, ĉar temas pri prepozicio, post PRI ne aperas nomo aŭ adjektivo sub akuzativa formo (-n), escepte se la prepozicio PRI agadas kiel prefikso unuigita al la verbo aŭ al la substantivo:

Ni diskutis pri politikaj aferoj.

Ni ĉeestis pripolitikan diskuton.

Ni pridiskutis politikajn aferojn.

Turismi en ... Roquetas de Mar (Almerio)

Verŝajne temas pri la sola andaluzia vilaĝo kiun oni povas distingi el la spaco, pro la fakto ke, apud la vilaĝo troviĝas oceano de forcejoj kies plastikaj tegmentoj kapablas reflekti la sunan lumon. Apud tiu terkultura produktado, la turismo estas la plej grava ekonomia rimedo de Roquetas de Mar en Almerio, ĝi situas tuj apud la mediteranea maro, do la nombro da hotelaj gastejoj de la vilaĝo estas unu el la plej grandaj en Andaluzio.

Fenicoj estis la unuaj enloĝantoj de la zono, tamen la unua stabila setlejo estis la romia urbo konita kiel Turaniana, tie la romianoj eltiris salon kaj oni profitis ankaŭ la akvan riĉecon de la zono. Kelkaj romiaj restaĵoj troveblas, inter ili mejlo-ŝtono kiu pruvas, ke Turaniana (nuntempa Roquetas de Mar) situis ĉe grava romia vojo. Post la romianoj la araboj starigis kelkajn defend-turojn apud la marbordo, similaj al malgrandaj fortresoj, inter ili la “kastelo de Santa Ana”, ankaŭ konata kiel “Kastelo de Roquetas”.



Blazono de Roquetas de Mar

Post la kastilia konkero la tuta zono estis konsiderata kiel altvalora cele la defendon de la marbordo kontraŭ la atakoj de berberiskaj piratoj, tamen iompost-iome la ĉefaj ekonomiaj rimedoj de la tuta zono estis la produktado de salo kaj la fiŝkaptado. Tiuepoke, en la jaro 1573, aperas la unua mencio pri loko nomita *Roquetas*, okaze de distribuo de ter-pecoj oni parolas pri zono ĉirkaŭ kastelo kun la nomo “Las Roquetas”. La sufikso *-et* post la hispanlingva “*Rocas*” (ŝtonoj), pruvas la fakton, ke

estis oftaj la vizitoj en la zonan de valenciaj maristoj aŭ fiŝkaptistoj. Do, verŝajne la nomo *Roquetas* havas valenci-lingvan originon.

Dum la sekvantaj jarcentoj sur la zono troviĝis nur kelkaj domoj starigitaj ĉirkaŭ la kastelo de Sankta Ana de fiŝkaptistoj, ili administracie, apartenis al la municipo Felix kaj la zono estis konata kiel Las Roquetas. Sed ĉi ĉio sanĝiĝis meze de la 20-a jarcento kiam aperas la etenda kultivado en Roquetas. Tiel, en la jaro 1963 oni konstruas la unuan forcejon, apenaŭ cent kvadrataj metroj. Hodiaŭ pli ol 2.000 hektaroj produktas legomojn kaj fruktojn sub forcejoj kaj kiel dirite, ili estas videblaj el la spaco mem.

Roquetas ankaŭ estas turisma urbo. En ĝi troviĝas hoteloj oferantaj pli ol 25.000 gast-lokojn, oni devas diri, ke Roquetas havas 90.000 enloĝantojn. Krome ekzistas gulfejo, la plej granda akvario kaj dek tri kilometroj da promenejoj apud la marbordo.

Monumentoj:

- Kastelo de Sankta Ana.



Temas pri malgranda fortreso starigita dum la 16-a jarcento, sur alia araba turo. La celo de la turo estis defendi la marbordon kontraŭ la atakoj de berberaj piratoj. La turo reale estas malgranda fortreso kun du etaĝoj.


La urbodomo de Roquetas aĉetis la proprietaĵon kaj en la jaro 2003 oni malfermis en tiu fortreso novan kulturejon de la urbo.

- Arkeologia restaĵoj ĉe *La Ribera de la Algaida*.

En la jaro 1859 oni eltrovis restaĵojn datumitajn en la Bronz-epoko sur la loko kie poste la romianoj fondis la urbon *Turaniana*. En tiu zono ankaŭ aperis romiaj kaj arabaj restaĵoj.

- Posidoni-rifo.

Temas pri natura rifo tuj apud la marbordo en Roquetas. Ĉe ĝi troviĝas pli ol 800 fiŝaj kaj vegetalaj specoj.



Gastronomio:

La gastronomio en Roquetas baziĝas sur la mara produktoj, do la fiŝkaptado en tiu zono alportas altkvalitajn produktojn. Krome, legomoj kaj fruktoj estas ankaŭ bonegaj. La plej popularaj fiŝoj sur la kuirejoj en Roquetas estas la trigloj, labrakoj, or-fiŝoj kaj mar-fruktoj kiel la blanka salikoko.

Kuirajo tipa de Roquetas estas la *arroz aparte*, tre famaj kaj bongustaj ankaŭ estas la *zarzuela* kaj la *gurullos*.

Festoj:

Kiel ĉiuj andaluziaj marbordaj vilaĝoj meze de julio oni festas la tagon de la Virgulino del Carmen. Ankaŭ kiel mediteranea vilaĝo dum la Nokto de Sankta Johano oni bruligas lignaĵojn dum tiu nokto, la plej mallonga en la jaro.

ALIGU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Caja General de Ahorros de Granada
ES45 2031 0225 54 0100187657

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2017

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.



Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Paul Linares Rapet

La norda regiono de la kordova provinco estas zono riĉa je mineraloj. Minejoj en vilaĝoj Belmez kaj Peñarroya-Pueblonuevo altiris la atenton de minejaj kompanioj, ĉefe francaj, kiuj investis kapitalojn kaj alvenigis inĝenierojn por eltiri tiun riĉecon, ĉefe karbon. Unu el tiuj francaj inĝenieroj nomiĝis Paul Linares Rapet, ankaŭ konata en Kordovo kiel Pablo Linares, tiu nomo provus lian eblan hispanan devenon, malgraŭ lia franca civitaneco, kiun li havis ĉiam.

El la profesia vidpunkto la ĉefa agado de Paul Linares estis aĉeti minejajn koncesiojn, havigitaj de la hispana registaro, de minejoj en Andaluzio kaj La Manĉo. Sciante, ke li investis sian monon en koncesioj de Ciudad Real, Montoro, Conquista kaj Hornachuelos, kie oni eltiris ĉefe karbon, feron kaj baŭksiton. Tiuj investoj havigis al S-ro Linares pri sufiĉa mon-kapitalo kiu ebligis lin dediĉi al du ĉefaj agadoj: vegetaranismo kaj esperanto.



Ofta reklamo sur kordovaj
ĵurnaloj en la jaro 1908

Paul Linares lernis la internacian lingvon en Francio, do, kiam li venis en Kordovo komence de la 20-a jarcento li regis esperanton kaj eĉ partoprenis aktive en la movado. Li eĉ ĉeestis la Universalan Kongreson en la jaro 1908 okazigita en Dresde

(Germanio). Post reveni el tiu kongreso li ekdisvastigis esperanton en la urbo kie li loĝis: Kordovo. En ĉi tiu urbo lia hejmo troviĝis ĉe unu el la plej tipaj kvartaloj, la Korto de Sankta Bazilo, tie li posedis grandan domon kun propra korto, el kiu li eltiris siajn proprajn vegetaĵojn ĉar, kiel dirite, li estis fervora vegetarano. Interkrampe ni diru, ke li estis

aktiva kontraŭ-taŭrludado, li eĉ tiutempe ekigis kampanjon kontraŭ la morto de la taŭroj en tiuj spektakloj, en tiu tempo kaj en urbo kie la taŭro-ludado estis konsiderata nacia festo.

Nu, lia unua agado favore al esperanto estis la ofta publikigo fine de la jaro 1908, de reklamoj sur la kordovaj ĵurnaloj kie li oferis sin mem, kaj sian propran hemojn, por klarigi kaj instrui senpage esperanton al ĉiuj eblaj interesitoj. Unu jaron poste, en 1909, li sukcesis pri la organizado de ne-deviga kurso de esperanto en la Gimnazio de Kordovo. Ni ne scias ĉu li estis sukcesa aŭ ne rilate tiujn agadojn, tamen estas necese diri, ke en tiu sama jaro, 1909, 40 kordovanoj fondis la unuan esperanto-grupon en Kordovo kaj tiam Paul Linares Rapet estis nomumata la unua prezidanto de la grupo. Unu jaron poste, en 1910, Hispana Societo por la Propagado de Esperanto, okaze de asembleo, gratulis S-ron Linares pro liaj konstantaj agadoj en Kordovo cele la disvastigon de la zamenhofa lingvo.

La laboroj por disvastigi la lingvon en Kordovo plenumitaj de S-ro Linares estis senĉesaj. En la jaro 1911, li prelegis ĉe la Junulara Respublika Centro pri la temo “Internaciismo kaj Esperanto”, tio alvenigis pliajn novajn membrojn en la kordovan grupon kiu renkontiĝis ĉe la



San Basilio, tipa kvartalo el kie S-ro Linares disvastigis esperanton en Kordovo en 1908

granda domo de la prezidanto sur la strato San Bartolomé n-ro 2, meze de la kvartalo San Basilio, tre proksime al la kordova Moskeo. La ĵurnalo *DIARIO DE CÓRDOBA* en septembro aperigis ampleksan

intervjuon al li, tiam li estis prezentata kiel klera homo konanta ne nur esperanton, sed ankaŭ la klasikajn latinan kaj grekan lingvojn, krom la franca kaj la germana. Li respondis simpatie ĉiujn demandoj kaj li oferis informojn ne nur pri esperanto kiel lingvo, sed ankaŭ pri la movado mem, ni devas memori, ke li tiam estis delegito en Kordovo de Universala Esperanto-Asocio.

Mi ne trovis datumojn pri la tiutempa aĝo de nia kordova samideano, tamen la ĵurnalo prezentas lin kiel sufiĉe oldan homon, eble pro tio fine de la 10-a jardeko li agadas nur kiel honora prezidanto de la grupo, tamen lia nomo aperas okaze de ĉiuj kunvenoj de la kordova esperantistaro eĉ dum la 20-a jardeko. Li edziĝis en la jaro 1929 kun Sino Dolores Victoria Iglesias Fernández, supozeble li estis tre maljuna tiam. Li forpasis en la monato julio de 1934, kelkajn jarojn antaŭe li estis nomumita Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio.

J.M.R.H.

Korektigo:

Sur la sekcio “Paĝoj pri nia historio: notoj pri Esperanto kaj Andaluzio” de la pasinta numero, ni parolis pri tri elstaraj samideanoj mortpafitaj “antaŭ 70 jaroj”, en la jaro 1936. Evidente temas pri kalkula eraro, tio okazis antaŭ 80 jaroj.



FLAMENKO

Calixto Sánchez

Calixto Sánchez estas elstara figuro en la nuntempa flamenka arto. Li naskiĝis en Mairena del Alcor, vilaĝo en la provinco Sevilo en la jaro 1947 kaj jam infan-aĝe li kantis ĉe la trinkejo de sia patro. Tiam li estis konata kiel *la infano Calixto*. Nur 18-jaraĝa li atingis premion en



la branĉo “levantenaj kantoj” en konkurso organizata en sia vilaĝo. En la jaro 1972 li atingis grandan sukceson dank’al sia triumfo en la plej grava flamenka festivalo organizata en Granado tiujare, koincide kun la 50-a datreveno de la Flamenka Konkurso de tiu urbo.

Lian unuan diskon oni surbendigis en la jaro 1974 kun la titolo “Estilos Flamencos” (Flamenkaj Stiloj), akompanita gitarlude de Melchor de Marchena. En la jaro 1980 li atingis la unuan premion de la Flamenka Festivalo de Sevilo, konkurso kiun ankaŭ ĉeestis aliaj grandaj kantistoj kiel Fosforito, Curro Malena kaj José de la Tomasa. En 1984 aperis la disko “De los Alcores a Granada”, tie li aperigis flamenkajn adaptojn de poemoj de Rafael Alberti. En 1987 aperis “Calle Ancha” kun tekstoj de la poeto Antonio Machado kaj de Calixto Sánchez mem, ni ne devas forgesi, ke el la profesia vidpunkto Calixto Sánchez estas instruisto.

Ekde la jaro 1985 li estas Direktoro en Sevilo de la Seminario pri Flamenkaj Studoj kaj li instruas pri flamenko en la Pedagogia Fakultato de la tiea universitato. Krome, li organizis diversajn kursojn en tiu fakultato pri la temo “Didaktiko de la Flamenka Arto”. Li ankaŭ estas

aŭtoro de diversaj libroj kiuj celas faciligi la instruadon de flamenko en la andaluziaj lernejoj. Liaj lasta diskoj estas “De la lírica al cante” (1996), “Camino de la Vida” (1997) kaj “Retrato Flamenco” (2001), dediĉita speciale al la sevila poeto Antonio Machado. Dum kvin jaroj li estis Direktoro de la Andaluzia Centro pri Flamenko de la Andaluzia Registaro kun sidejo en Jerezo.

Kiel flamenka kantisto, li estas samtempe tradiciema kaj noviganto, kun potenca voĉo pere de kiu li sukcesas ludi ĉiujn stilojn de la flamenka kantado.

*Verdaj algoj en la mar’
plataj ĉe l’estuario sude.
Grajnoj de mara sal’
Kaj la vento tuj-apude.*

Partoj de la flamenka gitaro



ANDALUZIA KUIRARTO

Caldo Quemao (Bruligita Buljono)

Caldo Quemao, kiun ni povus traduki en esperanton kiel “bruligita buljono”, estas recepto de la provinco Almerio kiu unuigas perfekte l’o plej bona el la maro kaj el la tero. Temas pri saporoj kiuj kontrastas, kaj jen la plej grava karakterizaĵo de ĉi tiu recepto.

Jen la necesaj ingredientoj:

- 2 ruĝaj paprikoj.
- 1 verda papriko.
- 4 freŝaj sardinoj.
- 2 grandaj ter-pomoj.
- 3 tomatoj.
- Salo.
- Ajlo.
- Oliv-oleo.
- Kumino.
- Akvo.



Jen la preparado:

Verŝu iomete da akvo en poton kaj metu tien du ruĝajn paprikojn, lasu ilin tie dum 40 minutoj. Post tiu tempo, eltiru la paprikojn, senŝeligu ilin. Ne forĵetu la akvon, ni uzos ĝin denove poste. Pistu ilin en pistejo, aldonu iomete da salo, kuminon kaj du ajlerojn.

Alie, leĝere fritu distranĉitan cepon kaj tri tomatojn. Ene de alia poto metu la antaŭan pistajon kune kun verda papriko ankaŭ distranĉita, aldonu du ter-pomojn tranĉitajn laŭ malgrandaj kvadratetoj.

Kiam la ter-pomoj estas molaj, aldonu ilin en la fritajon (cepon + tomatojn). Daŭrigu la leĝeran fritadon. Aldonu poste la akvon uzitan por senŝeligi la ruĝajn paprikojn. Aldonu iomete da salo kaj ĉio devas esti kuirita leĝere dum 25 minutoj.

Finfine, aldonu la sardinojn (sen kapoj kaj fiŝ-ostoj) kaj daŭrigu la leĝeran kuiradon sur la fajro dum pliaj 5 minutoj.

En la kuirejo



teleru



forko



tranĉilo



kulero



kulereto / deserto-kulero



taso



glaso



botelo



pesilo



pato



kaserolo



rostilo




miksilo



fridujo



teler-lavilo



mikroonda forno

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Mi loĝas sola !

Ene de ĉi tiu sekcio ni ofte parolas pri misteraj okazintaĵoj, tio estas, aferoj kiuj okazis en la pasinteco, sed ne nuntempe. Do, hodiaŭ ni prezentas al niaj legantoj aferon okazantan nun ĉe kampar-domo situita je kelkaj kilometroj el la urbo Kordovo kaj kiu, sendube, baldaŭ estos pritraktata de tiuj televidaj kaj radiaj programoj kiun pristudas ĉi tiajn misterajn aferojn.

La ĉefroluloj estas juna paro kiu loĝas en kampar-domo de kvartalo de Kordovo. Iufoje li sentis ion strangan ĉe li, temis pri vira voĉo kiu laŭte kaj klare nomis lin per lia nomo mem, do, sendube devus esti iu de li bone konata. Kiam tio okazis, li vidis senkorpan silueton. Post tiu unua apero la sonoj ne ĉesis, batoj kaj ĉefe dumnoktaj malrapidaj paŝoj, kiel tiuj de maljunaj homoj. Tamen, li preferis diri nenion al sia edzino.

Kelkajn tagojn poste, ankaŭ ŝi sentis ion. Unuamomente ŝi pensis, ke temus pri la propra ezdo, tamen kiam ili interparolis pri la afero ili eltrovis ke tie okazis io stranga, malgraŭ tio ili preferis silenti. Tamen tiu kiu ne povis silenti estis la familia hundeto kiu ankaŭ loĝis tie. Ĝi bojis kaj graŭlis ĉe loko kie, laŭvide, neniu estis. La paro tiam decidis inviti kelkajn geamikojn pasi tutan tagon tie, ĉiuj gastoj aŭdis tiujn strangajn sonojn, tute similaj al la paŝoj de maljunulo tra la koridoro.

La paro decidis tiam kontakti kun grupo en Kordovo pristudanta tiujn misterajn aferojn. Ili instalas sonbendigilon en la koridoro kaj post la demando: “*Kiu vi estas?*” La respondo aperis tute klara: “*Mi loĝas sola!*”. La viro surprize konis la voĉon, temis pri sia propra onklo kiu loĝis ĉe la kampara domo, apud la paro, ĝis sia

forpaso. La voĉo estis facile rekonebla, pro la fakto, ke gorĝo-kancero deformis ĝin. Poste ili memoris, ke dumnokte la onklo devis iri ofte en la banejon pro vezik-sufero. Post la morto de la onklo, la nevoj disblovis la cintrojn tra la ĝardeno ĉirkaŭ la domo.

Ĉu la paro forlasis timege la domon? Tute ne. Laŭ ili, la forpasinta familiano prizorgas ilin, tion pruvus la fakto, ke iunokte laŭta voĉo vekis la virinon. Neniam tio okazis antaŭe, ĉar dumnokte oni aŭdis nur paŝojn en la koridoro, sed neniam voĉojn, tamen tiunokte la bruo estis simila al laŭta voĉo. Tuj post vekiĝi la virino rigardis sian edzon, kiu fartis ege malbone pro malaltega glukozemio. En tiu momento li savis sian vivon ĉar ili rapide iris en la hospitalon. Do, ili opinias, ke verdire la onklo prizorgas ilin. Tamen, la parapsikologoj ne komprenas kial la fantomo diris, ke li loĝas sola, se li reale scias, ke la nevoj ankaŭ loĝas tie.

Nu, nekredebla mistera epizodo, pri kiu ni tutcerte scios baldaŭ sur televidaj programoj.



Por kontakti kun la revuo, bv. uzi la jenan adreson:

esperanto14@ono.com



Krucvortenigmo

	a	b	c	ĉ	d	e	f	g
1								
2			■					
3							■	
4			■					
5				■		■		
6								■
7					■			
8	■							

1. Plurale, ŝtontabulo prezentanta probable prahistorian tombejon.
2. Prepozicio montranta spacon de kies interno io sin movas eksteren. ■ Ansero-forma birdo kun mallonga kolo kaj egallarĝa beko.
3. Plurale, proza aŭ poezia verko, kiu presite plenigas foliaron. ■ Vokalo.
4. Inverse, persona pronomo. ■ Adjektive kaj plurale, rando de ŝtofo refaldita kaj kudrita.
5. Sen la lasta vokalo, muskola kava organo. ■ Konsonanto. ■ Inverse kaj sen la lasta vokalo, kolekto da samspecaj objektoj.
6. Inverse kaj sen la lasta vokalo, la pli granda parto aŭ kvanto, kompare kun la malpligranda.
7. Inverse, grasa likvaĵo. ■ Ludkarto, ĵetkubo aŭ domenpeco kun unu sola punkto.
8. Dum ĉi tiu momento, tirane premeĝi.

- a. Kontraŭleĝa puninda ago, malpli grava ol krimo.
 b. Andaluzia verda oro.
 c. Konsonanto. ■ Konsonanto. ■ Kvazaŭ prefikso uzata kun la senco indiki nedifinitan kvanton da nombrebaj aferoj.
 ĉ. Vasta etendaĵo de sala akvo. ■ Sen la lasta vokalo, kutima konduto de iu popolo.
 d. Meti objektojn unu post la alia. ■ Vokalo.
 e. Sen la lasta vokalo, pinta metala stangeto servanta por fiksi objekton. ■ Inverse kaj se la lasta vokalo, vulgara nomo de natria klorido.
 f. Verba finaĵo. ■ Inverse, prezentanta krude raspecan supraĵon.
 g. Inverse kaj plurale, herbo kun bulbo kaj kun inflorescimo umbelsimila. ■ Verba finaĵo.



HUMURO

La numero 102-a de nia revuo aperos fine de la monato decembro.
 Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
 Apartado de Correos 3142
 14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



Nuevo curso de esperanto para hispano-parlantes
en www.duolingo.es